D'autres mots

- *almenaŭ* – au moins
- *atenti* – prêter attention
- *ĉirkaŭ* – autour de
- *diversa* – divers, différent, varié
- *do* – donc
- *ekster* – hors de
- *ideo* – idée
- *klara* – clair
- *kredi* – croire
- *kvazaŭ* – pratiquement
- *maniero* – manière
- *manki* – manquer
- *mondo* – monde
- *organizi* – organiser
- *plano* – planifier
- *pluvi* – pleuvoir
- *rajti* – avoir le droit de
- *rakonti* – raconter
- *sama* – même
- *ŝajni* – sembler
- *vojo* – voie
- *informi* – informer

Grammaire

Le conditionnel se forme en ajoutant la terminaison *-us* à la racine du verbe.

Attention : en espéranto, on utilise aussi la forme *-us* pour exprimer la condition, là ou, en français, on on utilise l'imparfait.

- *mi kred**us*** – je croirais

- *Se mi est**us** sana, mi est**us** tre feliĉa.* – Si j'étais en bonne santé, je serait très heureux.

Kvazaŭ est utilisé comme une conjonction, et est normalement suivi du conditionnel :

- *Vi sidas tie **kvazaŭ** vi estus riĉulo.* – Tu es assis là, comme si tu étais quelqu'un de riche.

On peut aussi sous-entendre le verbe :

- *Vi sidas tie **kvazaŭ** riĉulo.* – Tu es assis là comme un riche.

Le suffixe *-ad* est utilisé pour former le nom d'une action d'après un verbe :

- *kanti* – chanter
  - *kant**ad**o* – chant (action de chanter)
- *suferi* – souffrir
  - *sufer**ad**o* – souffrance

Il peut aussi donner l'idée d'une action continue ou répétée :

- *rigardi* – regarder
  - *rigard**ad**i* – observer, examiner
- *demandi* – demander, poser une question
  - *demand**ad**i* – ne pas arrêter de poser des questions
- *informo* – une information
  - *inform**ad**o* – information (l'action)

Le suffixe *-ar* indique une collection ou un ensemble de choses qui forment un tout :

- *arbo* – arbre
  - *arb**aro*** – forêt
- *vagono* – wagon
  - *vagon**aro*** – train
- *vorto* – mot
  - *vort**aro*** – dictionnaire

Le suffixe *-um* est un suffixe joker sans signification particulière :

- *plena* – plein
  - *plen**umi*** – remplir
- *proksima* – proche
  - *proksim**ume*** – environ
- *suno* – soleil
  - *sun**umi*** – prendre un bain de soleil
- *malvarm**umi*** – attraper un rhume

Exercices

Traduisez

- nekredebla : ______________________________
- organizado : ______________________________
- informado : ______________________________
- libervole : ______________________________

- parolado : ______________________________
- survoje : ______________________________
- homaro : ______________________________
- kredeble : ______________________________
- kunvojaĝi : ______________________________
- manĝaĵo : ______________________________
- novaĵo : ______________________________
- vagonaro : ______________________________
- ĉirkaŭaĵo : ______________________________
- parolrajto : ______________________________
- domaĉo : ______________________________
- tiuokaze : ______________________________

Complétez les phrases

- Se mi havus tiom da mono kiom da ideoj, mi vojaĝ______us ĉirkaŭ la mondo.
- En ĉiu vort______o mankas kelkaj vortoj.
- Homo, kiu longe rakont______as ĉe la manĝotablo, restos malsata.
- Li devis atenti kaj ne rajtis longe resti ekstere en pluvo. Tial li malvarm______is.
- Li havas sian klaran ideon, sed li kredos ĉion, kion vi diros, ________________ vi estus lia edzino.

Traduisez et répondez

Qu’est-ce qui pourrait le plus réjouir tes parents ?

- Quoi : ______
- pourrait : ______
- le plus : ______
- réjouir : ______
- tes : ______
- parents : ______

Si au moins allais après l’école avec moi au centre-ville !

- Si : ______
- au moins : ______
- tu : ______
- après : ______
- l’ : ______
- école : ______
- irais : ______
- avec : ______
- moi : ______
- à : ______
- le : ______
- centre-ville : ______

Où voudrais-tu voyager si tu avais suffisamment d'argent et de temps ?

- Où : ______________________
- tu : ______________________
- voudrais : ______________________
- voyager : ______________________
- si : ______________________
- tu : ______________________
- avais (litt. aurais) : ______________________
- assez : ______________________
- de : ______________________
- arget : ______________________
- et : ______________________
- temps : ______________________

Est-ce que tu prévois d'aller à Paris en voiture ou, est-ce-que cela ne semble pas beaucoup mieux, en train ?

- Est-ce que : ______________________
- tu : ______________________
- prévois : ______________________
- aller : ______________________
- à : ______________________
- Paris : ______________________
- avec : ______________________
- voiture : ______________________

- ou : ______________________________
- est-ce-que : ______________________________
- ne : ______________________________
- semble : ______________________________
- beaucoup : ______________________________
- plus : ______________________________
- bon : ______________________________
- par : ______________________________
- train : ______________________________

Pourquoi différentes personnes expliquent les mêmes idées de façons différentes ?

- Pourquoi : ______________________________
- différentes : ______________________________
- personnes : ______________________________
- expliquent : ______________________________
- mêmes : ______________________________
- idées : ______________________________
- de façons différentes : ______________________________

Solvoj

Traduisez

- nekredebla : incroyable
- organizado : organisation
- informado : information
- libervole : volontairement, librement
- parolado : discours
- survoje : sur la route, en route, en chemin, sur le chemin

- homaro : humanité
- kredeble : probablement, sans doute, sûrement
- kunvojaĝi : voyager avec
- manĝaĵo : nourriture, aliment, aliments
- novaĵo : nouvelles, informations
- vagonaro : train
- ĉirkaŭaĵo : les alentours, les environs, les parages
- parolrajto : droit de parole
- domaĉo : maison en ruine, bicoque, masure
- tiuokaze : à cette occasion

Complétez les phrases

- Se mi havus tiom da mono kiom da ideoj, mi vojaĝ**ad**us ĉirkaŭ la mondo.
- En ĉiu vort**ar**o mankas kelkaj vortoj.
- Homo, kiu longe rakont**ad**as ĉe la manĝotablo, restos malsata.
- Li devis atenti kaj ne rajtis longe resti ekstere en pluvo. Tial li malvarm**um**is.
- Li havas sian klaran ideon, sed li kredos ĉion, kion vi diros, **kvazaŭ** vi estus lia edzino.

Traduisez et répondez

Qu'est-ce qui pourrait le plus réjouir tes parents ?

- Quoi : Kio
- pourrait : povus
- le plus : plej
- réjouir : ĝojigi
- tes : viajn
- parents : gepatrojn

Si au moins allais après l'école avec moi au centre-ville !

- Si : Se
- au moins : almenaŭ
- tu : vi
- après : post
- l' : la
- école : lernado
- irais : irus
- avec : kun
- moi : mi
- à : en
- le : la
- centre-ville : urbocentron

Où voudrais-tu voyager si tu avais suffisamment d'argent et de temps ?

- Où : Kien
- tu : vi
- voudrais : dezirus
- voyager : vojaĝi
- si : se
- tu : vi

- avais (litt. aurais) : havus
- assez : sufiĉe
- de : da
- arget : mono
- et : kaj
- temps : tempo

Est-ce que tu prévois d'aller à Paris en voiture ou, est-ce-que cela ne semble pas beaucoup mieux, en train ?

- Est-ce que : Ĉu
- tu : vi
- prévois : planas
- aller : veturi
- à : al
- Paris : Parizo
- avec : per
- voiture : aŭto
- ou : aŭ
- est-ce-que : ĉu
- ne : ne
- semble : ŝajnas
- beaucoup : multe
- plus : pli
- bon : bone
- par : per
- train : vagonaro

Pourquoi différentes personnes expliquent les mêmes idées de façons différentes ?

- Pourquoi : Kial
- différentes : diversaj
- personnes : homoj
- expliquent : klarigas
- mêmes : samajn
- idées : ideojn
- de façons différentes : diversmaniere

Familianoj kunvenas

– Kiel rapide pasas tagoj ! Morgaŭ estas la naskiĝtago de via patro, Marko. Alvenos kelkaj familianoj kaj geamikoj. Ĉu vi bonvolus iom helpi ? Trovu iomete da tempo almenaŭ por ordigi vian ĉambron. Mi ŝatus kuiri ion bonan. Por la naskiĝtaga kuko mankas lakto en la hejmo. Necesas havigi iom da manĝaĵo el vendejo…

– Bone, mi aĉetumos por la naskiĝtago. Sed, anstataŭ sidi kaj manĝegi kun neinteresaj familianoj, mi ŝatus ekskursi kun klubanoj.

– Kun kiuj klubanoj ? – diris la patrino kaj ĵetis iajn paperojn en paperujon.

– Morgaŭ frue kunvenas anoj de mia sporta klubo.

– Sed, kara mia, ĉu ĝuste morgaŭ vi devas foresti ? Ĉu vi ne intervidiĝas kun viaj samklubanoj trifoje semajne ?

– Ĉu mi rajtas ion proponi : Mi kunmanĝos kun la familianoj. Sed en la dua parto de la tago mi foriros kun miaj geamikoj. Post la kuko Maria kaj Petro certe parolos pri la malsukcesa veturado per aŭto. Malinterese ! Mi ne plu volas tion aŭdi ! Kial ni ne havas iun ideoriĉan onklon Bonifacio en nia familio ?!

La patrino ridetis je liaj vortoj. Ŝi scias, ke Marko iom tro parolas hodiaŭ.

– Kara Marko, ne sufiĉas nur riĉeco de la ideoj. Necesas ankaŭ plena monujo por realigi ilin.

La patrino post iom da silento daŭrigis :

– Nu, antaŭ kelkaj minutoj telefonis Ana, ke ankaŭ ŝi vizitos nin morgaŭ. Ŝi tre ŝatas dolĉajn kukojn, kvankam ŝi atentos por ne dikiĝi.

Tuj Marko ŝanĝis la opinion. Sen Ana dum la ekskurso li estus tre soleca.

– Patrino, tiuokaze mi tamen pasigos la morgaŭan tagon hejme.

Nouveaux mots

Dans le texte

- *kiel* – comment
- *pasi* – passer
- *naski* – donner naissance
- *kelka* – quelques
- *familio* – famille
- *an* – membre d'un groupe
- *iom* – un peu
- *trovi* – trouver
- *almenaŭ* – au moins
- *ordo* – commander
- *io* – quelque chose
- *manki* – manquer
- *lakto* – lait
- *necesa* – avoir besoin
- *anstataŭ* – à la place de
- *intereso* – intéresser
- *ekskurso* – excursion
- *klubo* – club
- *ĵeti* – jeter
- *ia* – une sorte de
- *uj* – contenant, pays
- *ĝusta* – juste

- *for* – éloignement, disparition
- *inter* – entre, parmi
- *sama* – même
- *fojo* – fois
- *rajti* – avoir le droit de
- *proponi* – proposer
- *du* – deux
- *parto* – partir
- *sukceso* – succès
- *iu* – quelqu'un
- *ideo* – idée
- *tro* – trop
- *ec* – qualité abstraite
- *reala* – réél
- *silento* – silence
- *daŭri* – continuer
- *nu* – euh
- *minuto* – minute
- *telefono* – téléphone
- *viziti* – visiter
- *dolĉa* – doux
- *atenti* – prêter attention
- *dika* – gros
- *ŝanĝi* – changer
- *opinii* – opinion
- *sen* – sans
- *sola* – seul

D'autres mots

- *ĉefo* – chef
- *ekzemplo* – exemple
- *rilati* – être en rapport avec, avoir trait à, concerner
- *sekvi* – suivre
- *simpla* – simple
- *universala* – universel

Grammaire

Le suffixe *-an* membre d'un groupe, habitant d'un lieu :

- *klub**ano*** – membre d'un club
- *urb**ano*** – citadin
- *Pariz**ano*** – Parisien
- *samide**ano*** – partisan d'une même idée (souvent utilisé pour les espérantistes)

Le suffixe *-ec* état ou qualité abstraite :

- *bel**eco*** – beauté
- *varm**eco*** – chaleur
- *simpl**eco*** – simplicité

Le suffixe -*uj* contenant, pays ou plante :

- *manĝ**uj**o* – mangeoire
- *cindr**uj**o* – cendrier
- *Franc**uj**o* – France
- *pomo* – pomme
  - *pom**uj**o* – pommier

Exercices

Traduisez

- verŝajne : ____________________
- tutsimple : ____________________
- neŭtraleco : ____________________
- tiurilate : ____________________
- universaleco : ____________________
- ebleco : ____________________
- partopreni : ____________________
- plejparte : ____________________
- samtempe : ____________________
- anstataŭigi : ____________________
- elĵeti : ____________________
- finiĝi : ____________________
- informiĝi : ____________________

Complétez les phrases

- En jun______o oni havas ankaŭ bel______on.
- Malsimplajn laborojn ĉefoj devus plisimpl______i.
- En tiu aĝo li jam fariĝis klub____________o de sporta klubo.
- Monon oni metas en mon______on.
- Sekvu la ekzemplon de la bonaj famili______oj.

Traduisez et répondez

Est-ce que l'amitié te rend plus heureux que l'amour ?

- Est-ce que : ______________________________
- amitié : ______________________________
- plus : ______________________________
- rend heureux : ______________________________
- toi : ______________________________
- que : ______________________________
- l' : ______________________________
- amour : ______________________________

À quelle fréquence écris-tu des lettres à tes amies en Italie ?

- Comment : ____________________
- souvent : ____________________
- tu : ____________________
- écris : ____________________
- des lettres : ____________________
- à : ____________________
- tes : ____________________
- amies : ____________________
- en : ____________________
- Italie : ____________________

Est-ce que la relation entre toi et tes professeurs ont changé ?

- Est-ce que : ____________________
- la : ____________________
- relation : ____________________
- entre : ____________________
- toi : ____________________
- et : ____________________
- ton : ____________________
- professeur : ____________________
- a changé : ____________________

Est-ce maintenant que tu connais déjà assez bien l'espéranto ?

- Est-ce que : ____________________
- tu : ____________________
- maintenant : ____________________
- déjà : ____________________
- connais : ____________________
- l'espéranto : ____________________
- assez : ____________________
- bien : ____________________

Solvoj

Traduisez

- verŝajne : sûrement
- tutsimple : simplement
- neŭtraleco : neutralité
- tiurilate : à cet égard, à ce propos
- universaleco : universalité
- ebleco : possibilité
- partopreni : participer, participer à, prendre part, prendre part à
- plejparte : surtout, principalement
- samtempe : en même temps
- anstataŭigi : remplacer
- elĵeti : jeter, déverser
- finiĝi : finir, se terminer
- informiĝi : s'informer

Complétez les phrases

- En jun**ec**o oni havas ankaŭ bel**ec**on.
- Malsimplajn laborojn ĉefoj devus plisimpl**ig**i.
- En tiu aĝo li jam fariĝis klub**estr**o de sporta klubo.
- Monon oni metas en mon**uj**on.
- Sekvu la ekzemplon de la bonaj famili**an**oj.

Traduisez et répondez

Est-ce que l'amitié te rend plus heureux que l'amour ?

- Est-ce que : Ĉu

- amitié : amikeco
- plus : pli
- rend heureux : feliĉigas
- toi : vin
- que : ol
- l' : la
- amour : amo

À quelle fréquence écris-tu des lettres à tes amies en Italie ?

- Comment : Kiel
- souvent : ofte
- tu : vi
- écris : skribas
- des lettres : leterojn
- à : al
- tes : viaj
- amies : amikinoj
- en : en
- Italie : Italio

Est-ce que la relation entre toi et tes professeurs ont changé ?

- Est-ce que : Ĉu
- la : la
- relation : rilato
- entre : inter
- toi : vi
- et : kaj
- ton : via
- professeur : instruisto
- a changé : ŝanĝiĝis

Est-ce maintenant que tu connais déjà assez bien l'espéranto ?

- Est-ce que : Ĉu
- tu : vi
- maintenant : nun
- déjà : jam
- connais : scias
- l'espéranto : Esperanton
- assez : sufiĉe
- bien : bone

La sentimulo

Estis vespero en Venecio. Centoj da homoj plenigadis la Sankt-Markan placon. Junuloj kaj militistoj, maristoj de sur la ŝipoj, elstaraj sinjorinoj, kaj junulinoj, alilandaj vojaĝantoj, ĉambristoj kaj gondolistoj – ĉiuj moviĝis al la urbomezo. Iom plue sed ne malproksime de la maro troviĝis malgranda placo. Fine de ĝi, proksime de la maro staris homo. Laŭ la vestaĵo oni facile povis ekscii, ke li estas gondolisto de iu riĉulo. Seninterese li rigardis la ĝojan hommulton. Subite rideto lumigis lian vizaĝon, kiam li ekvidis mariston,

kiu alvenis el la flanko de la maro.

– Ĉu tio estas vi, Stefano ? – ekkriis la gondolisto. Ĉiuj diras, ke vi falis en la manojn de la Turkoj.

– Vere. Ni renkontis unu el iliaj ŝipoj. Ĝi sekvis nin dum pli ol unu horo. Sed ne estas facile iri pli rapide ol nia ŝipo. Do, kiaj novaĵoj estas tie ĉi en Venecio ?

– Nenio interesa – nur granda malfeliĉo por Pietro. Ĉu vi konas Pietron ?

– Kompreneble, ke mi konas.

– Granda ŝipo subakvigis lian gondolon.

– Kaj kio pri Pietro ?

– Lia gondolo subakviĝis. Okazis, ke ni troviĝis proksime, tiel ke Ĝorĝo kaj mi prenis Pietron en nian gondolon. En la sama tempo mia estro subakviĝis por helpi junulinon, kiu preskaŭ jam mortis kun sia onklo.

– Ho, tie estis junulino – kaj onklo ?

– Lin ni ne povis helpi. Estis grava homo. Sed kio vin alvenigas en Venecion, amiko mia ?

La maristo rapide ekrigardis sian amikon kaj komencis diri :

– Do, vi scias, Ĝino, mi alportis ...

La gondolisto subite haltigis lin.

– Vidu. – li diris.

Tiam iu homo pasis apud ili. Li ankoraŭ ne estis tridekjara, kaj lia vizaĝo estis senkolora. Lia iro estis certa kaj facila. Lia vizaĝo estis malĝoja.

– Jakopo – diris Ĝino, kiam li ekvidis la homon – oni diras, ke multaj gravuloj donas sekretajn laborojn al li. Li scias tro da sekretoj.

– Kaj tial ili timas sendi lin en malliberejon – diris la maristo, kaj dum li parolis, li montris la domegon de la Doĝoj.

– Vere, multaj gravuloj bezonas lian helpon – diris Ĝino.

– Kaj kiom ili pagas al li por unu mortigo ?

– Certe ne malpli ol cent monerojn. Ne forgesu, ke li laboras por tiuj, kiuj havas sufiĉe da mono por pagi al li. Sed, Stefano, en Venecio estas aferoj, kiujn estas pli bone forgesi, se vi volas trankvile manĝi vian panon.

Estis iom da silento kaj poste la gondolisto denove ekparolis :

– Vi venis ĝustatempe por vidi ŝipkuron.

– Ĝino – iu diris malforte proksime de la gondolisto.

– Sinjoro ?

Don Kamilo Monforte, la estro de Ĝino senvorte montris al la gondolo.

– Ĝis revido – diris la gondolisto kaj prenis la manon de sia amiko.

Nouveaux mots

Dans le texte

- *Veneci* – Venise
- *Sankt-Mark* – Saint-Marc
- *placo* – place
- *milito* – guerre
- *maro* – mer
- *ŝipo* – navire, bateau
- *gondolo* – gondole
- *movi* – bouger
- *mezo* – milieu
- *proksima* – à côté
- *granda* – grand
- *oni* – on
- *facila* – facile
- *lumo* – lumière
- *flanko* – côté
- *Stefan* – Stéphane
- *krii* – crier
- *turko* – turc
- *renkonti* – rencontrer
- *sekvi* – suivre
- *Pietro* – Pietro
- *koni* – connaître
- *akvo* – eau
- *tiel* – ainsi
- *Ĝorĝo* – Georges
- *preni* – prendre
- *estro* – chef, principal
- *preskaŭ* – presque
- *morti* – mourir
- *grava* – important
- *Ĝino* – Gino
- *halti* – s’arrêter
- *apud* – à côté de
- *dek* – dix
- *jaro* – année

- *koloro* – couleur
- *Jakopo* – Jaques
- *tial* – pour cette raison
- *timi* – crainte
- *sendi* – envoyer
- *doĝo* – doge
- *bezoni* – avoir besoin
- *pagi* – payer
- *er* – fragment, petite pièce, particule
- *afero* – affaire
- *se* – si
- *pano* – pain
- *Don Kamilo* – Don Camillus
- *ĝis* – jusqu'à

D'autres mots

- *konsenti* – consentir
- *laŭta* – fort
- *proksimume* – approximativement
- *publika* – public
- *punkto* – point
- *sata* – rassasier

Grammaire

Le suffixe *-il* outil, instrument :

- *tranĉ**il**o* – couteau
- *hak**il**o* – hache
- *ŝlos**il**o* – clé
- *timig**il**o* – épouvantail

Exercices

Traduisez

- estraro : ______________________________
- tagmeze : ______________________________
- posttagmeze : ______________________________
- malsata : ______________________________
- interkonsenti : ______________________________

- manĝilaro : ____
- vidpunkto : ____
- malfermilo : ____
- noktomezo : ____
- publikigi : ____
- pagigi : ____
- duflanka : ____
- aliflanke : ____

Complétez les phrases

- La knabino ĵetis la paper______ en la paper____________.
- Kie estas mia skrib_________, mi volas respondi ______ li.
- La suno _________aperis kaj nun estas _____________________ malhele.
- Bonvolu manĝi la panon _________ manĝ______o.
- Pardon___ min, mi ne rajtas rest___.

Traduisez et répondez

Pouvez-vous apporter le médicament de ma soeur ?

- Est-ce que : ____
- vous : ____
- pouvez : ____
- apporter : ____
- le : ____

- médicament : ______________________
- de : ______________________
- ma : ______________________
- sœur : ______________________

Quand as-tu acheté cet instrument de musique ?

- Quand : ______________________
- tu : ______________________
- as acheté : ______________________
- ce, cet : ______________________
- instrument de musique : ______________________

Qui a utilisé ma clé dernièrement ?

- Qui : ______________________
- dernièrement : ______________________
- a utilisé : ______________________
- ma : ______________________
- clé : ______________________

Vous êtes-vous déplacés à Venise en gondole aussi ?

- Est-ce que : ____________________
- vous : ____________________
- à, dans : ____________________
- Venise : ____________________
- êtes déplacés : ____________________
- aussi : ____________________
- en : ____________________
- gondole : ____________________

Est-ce que pourra t'endormir quand ce sera silencieux ?

- Est-ce que : ____________________
- tu : ____________________
- pourras : ____________________
- [t'] endormir : ____________________
- quand : ____________________
- ce sera silencieux (litt. c'est devenu silencieux) : ____________________

Solvoj

Traduisez

- estraro : bureau, direction
- tagmeze : midi
- posttagmeze : après-midi
- malsata : affamé, affamée, qui a faim
- interkonsenti : se mettre d'accord, s'accorder
- manĝilaro : couverts
- vidpunkto : point de vue
- malfermilo : ouvreur, ouvre-boite, ouvre-boître
- noktomezo : minuit
- publikigi : publier

- pagigi : faire payer, laisser payer
- duflanka : recto-verso, des deux côtés, sur les deux côtés
- aliflanke : d'un autre côté, d'autre part, par ailleurs

Complétez les phrases

- La knabino ĵetis la paper**on** en la paper**ujon**.
- Kie estas mia skrib**ilo**, mi volas respondi **al** li.
- La suno **mal**aperis kaj nun estas **preskaŭ** malhele.
- Bonvolu manĝi la panon **per** manĝ**ilo**.
- Pardon**u** min, mi ne rajtas rest**i**.

Traduisez et répondez

Pouvez-vous apporter le médicament de ma soeur ?

- Est-ce que : Ĉu
- vous : vi
- pouvez : povas
- apporter : kunporti
- le : la
- médicament : sanigilon
- de : de
- ma : mia
- sœur : fratino

Quand as-tu acheté cet instrument de musique ?

- Quand : Kiam
- tu : vi
- as acheté : aĉetis
- ce, cet : tiun
- instrument de musique : muzikilon

Qui a utilisé ma clé dernièrement ?

- Qui : Kiu
- dernièrement : laste
- a utilisé : uzis
- ma : mian
- clé : ŝlosilon

Vous êtes-vous déplacés à Venise en gondole aussi ?

- Est-ce que : Ĉu
- vous : vi
- à, dans : en
- Venise : Venecio
- êtes déplacés : veturis
- aussi : ankaŭ
- en : per
- gondole : gondolo

Est-ce que pourra t'endormir quand ce sera silencieux ?

- Est-ce que : Ĉu
- tu : vi
- pourras : povos
- [t'] endormir : ekdormi
- quand : kiam
- ce sera silencieux (litt. c'est devenu silencieux) : silentiĝis

Nokta promeno

S-ro Pipelbom estis alta, dika, peza kaj larĝa. Tio donis al li havindan korpoforton, kaj lia grandula aspekto ludis ne etan rolon en la fakto, ke la plimulto el la homoj, se ne lin timis, certe respektis kaj almenaŭ pripensis antaŭ ol decidi malkontentigi lin.

Sed tio, kio estas ofte utila dumtage, prezentas per si malplaĉan ĝenon dumnokte en loko arboplena. Ĉefe kiam oni devojiĝis kaj ekstervoje iraĉas en nehoma sovaĝejo.

La dika, peza, alta larĝa korpo ne sukcesis pasi senbrue inter la arbetoj ; krome tuŝi la naturaĵojn, ĝenerale malsekajn, meze de kiuj li malfacile paŝis, estis travivaĵo ne malofte doloriga kaj ĉiam malagrabla. Ju pli li antaŭeniris en la vivo – kaj ju pli antaŭeniris en la ĉe kastela arbaro des pli Adriano Pipelbom malŝatis la noktan naturon.

Viro kun okuloj, kiuj kapablis bone vidi en la mallumo, rigardis la malfacilan iron de nia industriisto. Li ridetis.

Apud tiu viro, en vestaĵo de policano, staris alia persono, en simila vestaĵo. Ĉi lasta estis virino.

"Ni iru," la viro diris mallaŭte en la orelon de sia kunulino. "Nun estas la ĝusta momento."

Ambaŭ paŝis direkte al la alta, larĝa, peza, dika persono. Ili zorgis fari kiel eble plej malmulte da bruo. Junaj, facilmovaj, ili preskaŭ plene sukcesis.

En ĉi tiu aĉa situacio, kie arboj sovaĝe ĵetis siajn malsekajn branĉojn rekte en la vizaĝon de la industriisto, kie multpiedaj bestetoj prenis liajn piedojn por promenejo, kie naturo faligis lian piedon plej dolorige en kavon plenan

de akvo aĉodora, Adriano Pipelbom rapide alvenis al la penso, ke oni devas ĉi tie esti preta por iu ajn malplaĉa renkonto. Ion ajn li efektive atendis, krom homa voĉo. Kiam do voĉo aŭdiĝis tuj proksime, li faris, ekmire, belan surlokan salton, kiu movis lian koron, ŝajne, supren ĝis la buŝo.

"Kio ?" li diris kun la provo sensukcese rekapti iom da trankvilo.

Sed la lumo de lampeto, kiun oni direktis rekte al liaj okuloj, malhelpis la repaciĝon. Krome, ŝajnis al li, ke la homformo, kiu tenis la lampon, surhavas vestojn policajn.

"Kion vi faras ĉi tie ?" sonis la aŭtoritata voĉo.

"Mi … mi … nuuuu … eee …" fuŝparolis Pipelbom.

"Bonvolu paroli iom pli klare," la alia diris eĉ pli grav-tone.

"Mi … mi … mi promenas."

"Ha ha. Vi promenas en la bieno de la grafino de Montokalva, meze de la nokto. Ĉu la grafino vin invitis ? Ĉu ŝi scias pri via ĉeesto ĉi tie ?"

"N … nu … N … ne. Mi …"

"Mi do devas peti vin min sekvi." Kaj li klarigis, ke ekde la fuŝa provo kapti la grafinon, fare de teroristoj, la polico kontrolas atente, kio okazas en la ĉirkaŭaĵo de la kastelo.

Al la industriisto ŝajnis, ke lia koro ĉifoje falis ĝis liaj piedoj. Li sciis, ke nur malfacile li povos trovi akcepteblan klarigon pri sia ĉeesto, kaj la ideo, ke la grafino ĉion scios, perdigis al li la malmulton da espero, kiu restis post la unuaj vortoj de la policano.

Nouveaux mots

Dans le texte

- *S-ro* – Monsieur – M.
- *Pipelbom* – Pipelbom
- *peza* – lourd
- *larĝa* – large
- *korpo* – corps
- *aspekto* – aspect
- *rolo* – rôle
- *fakto* – fait

- *respekti* – respecter
- *kontenta* – content
- *ofte* – souvent
- *utila* – utile
- *prezenti* – présenter
- *ĝeni* – gêner
- *nokto* – nuit
- *arbo* – arbre
- *ĉefo* – chef
- *vojo* – voie
- *ekster* – hors de
- *sovaĝa* – sauvage
- *bruo* – bruit
- *krom* – outre, à part
- *tuŝi* – toucher
- *naturo* – nature
- *ĝenerali* – géneral
- *seki* – sec
- *paŝi* – pas
- *vivi* – vivre
- *dolori* – douleur
- *agrabla* – agréable
- *ju* – plus (plus…, plus…), moins (plus…, moins…)
- *kastelo* – château
- *des* – plus (plus…, plus…), moins (plus…, moins…)
- *Adriano* – Adrian
- *viro* – homme
- *kapabla* – capable
- *industrio* – industrie
- *polico* – police
- *persono* – personne
- *simila* – identique
- *lasta* – dernier
- *laŭta* – fort
- *orelo* – oreille
- *momento* – moment
- *ambaŭ* – les deux
- *direkti* – direction
- *zorgi* – se soucier
- *situacio* – situation
- *branĉo* – branche
- *rekta* – directe
- *besto* – animal
- *promeni* – se promener
- *kavo* – cave
- *odoro* – sentir
- *preta* – prêt
- *ajn* – n'importe quel
- *efektiva* – effectif, réel, véritable
- *miri* – s'étonner
- *koro* – coeur
- *ŝajni* – sembler
- *supri* – au dessus
- *buŝo* – bouche
- *provi* – essayer
- *kapti* – attraper
- *lampo* – lampe
- *paco* – paix
- *formo* – forme
- *teni* – tenir
- *sono* – son
- *aŭtoritato* – autorité
- *nuuuu* – m'enfin
- *eee* – eh
- *fuŝi* – gâcher
- *klara* – clair
- *eĉ* – même
- *tono* – ton
- *ha* – ha

- *bieno* – propriété
- *grafo* – comte
- *monto* – montagne
- *kalva* – chauve
- *inviti* – inviter
- *peti* – demander
- *teroro* – terreur
- *kontroli* – vérifier
- *ĉirkaŭ* – autour de
- *akcepti* – accepter
- *perdi* – perdre

D'autres mots

- *aĉ* – indique un aspect négatif

Grammaire

Ju ... des

- *Ju pli longe, des pli bone.* – Plus c'est long, meilleur c'est.

Ajn

- *kiom ajn* – si nombreux que..., si fort que...

Le préfixe *dis-* séparation, dispersion :

- ***dis**ĵeti* – éparpiller, disperser
- ***dis**sendi* – émettre

Le suffixe *-on* permet de former les fractions :

- *du**on**o* – moitié
- *tri**on**o* – tiers
- *kvar**on**o* – quart
- *ses**on**o* – sixième

Exercices

Traduisez

- prezentaĵo : ______________________________
- skribaĉi : ______________________________
- klarigi : ______________________________
- pretigi : ______________________________
- ĉevalaĉo : ______________________________
- disdoni : ______________________________
- dekono : ______________________________
- duonigi : ______________________________
- virinaĉo : ______________________________
- ĉiumomente : ______________________________
- renkontiĝo : ______________________________
- retrovi : ______________________________

Complétez les phrases

- Antaŭ kvar______a horo ili ______venis.
- Post la terura _________feliĉo la homoj foriris kaj la malnovaj urboj _________falis.
- Ni devus ______vidi nin, mia amiko.
- ______ pli ofte mi pripensas, _________ pli mi koleras.
- Ŝi loĝas en iu _________ domo.

Traduisez et répondez

Est-ce qu'on se reverra, à un moment et quelque part ?

- Est-ce que : ____________________
- nous : ____________________
- reverrons : ____________________
- nous : ____________________
- quand : ____________________
- n'importe : ____________________
- et : ____________________
- où : ____________________
- n'importe : ____________________

Quand récupèrerai-je de nouveau l'autre moitié des livres ?

- Quand : ____________________
- je : ____________________
- récupèrerai : ____________________
- l' : ____________________
- autre : ____________________
- moitié : ____________________
- de : ____________________
- les : ____________________
- livres : ____________________

Est-ce que vous aurez besoin de plus d'un trimestre pour ces travaux ?

- Est-ce que : ________________
- vous : ________________
- aurez besoin : ________________
- plus : ________________
- de : ________________
- un quart : ________________
- année : ________________
- pour : ________________
- des : ________________
- travaux : ________________

Pourquoi est-ce que plus il fait froid, plus nous attendons longtemps ?

- Pourquoi : ________________
- est : ________________
- des : ________________
- plus : ________________
- froid : ________________
- le : ________________
- plus : ________________
- longtemps : ________________
- nous : ________________
- attendons : ________________

Est-ce que tu serais heureuse avec n'importe quel homme ?

- Est-ce que : ______
- tu : ______
- serais : ______
- heureuse : ______
- avec : ______
- n'importe : ______
- quel : ______
- homme : ______

Solvoj

Traduisez

- prezentaĵo : présentation
- skribaĉi : gribouiller, griffonner
- klarigi : expliquer
- pretigi : préparer
- ĉevalaĉo : rosse, mauvais cheval, canasson
- disdoni : distribuer
- dekono : dixième, 1/10
- duonigi : diviser en deux
- virinaĉo : mauvaise femme
- ĉiumomente : à tout moment
- renkontiĝo : rencontre, réunion
- retrovi : retrouver

Complétez les phrases

- Antaŭ kvar**on**a horo ili **re**venis.
- Post la terura **mal**feliĉo la homoj foriris kaj la malnovaj urboj **dis**falis.
- Ni devus **re**vidi nin, mia amiko.
- **Ju** pli ofte mi pripensas, **des** pli mi koleras.
- Ŝi loĝas en iu **ajn** domo.

Traduisez et répondez

Est-ce qu'on se reverra, à un moment et quelque part ?

- Est-ce que : Ĉu
- nous : ni

- reverrons : revidos
- nous : nin
- quand : kie
- n'importe : ajn
- et : kaj
- où : kiam
- n'importe : ajn

Quand récupèrerai-je de nouveau l'autre moitié des livres ?

- Quand : Kiam
- je : mi
- récupèrerai : rericevos
- l' : la
- autre : alian
- moitié : duonon
- de : de
- les : la
- livres : libroj

Est-ce que vous aurez besoin de plus d'un trimestre pour ces travaux ?

- Est-ce que : Ĉu
- vous : vi
- aurez besoin : bezonos
- plus : pli
- de : ol
- un quart : kvaronan
- année : jaron
- pour : por
- des : tiuj
- travaux : laboroj

Pourquoi est-ce que plus il fait froid, plus nous attendons longtemps ?

- Pourquoi : Kial
- est : estas
- des : des
- plus : pli
- froid : malvarma
- le : ju
- plus : pli
- longtemps : longe
- nous : ni
- attendons : atendas

Est-ce que tu serais heureuse avec n'importe quel homme ?

- Est-ce que : Ĉu
- tu : vi
- serais : estus
- heureuse : kontenta
- avec : kun
- n'importe : iu
- quel : ajn
- homme : viro